**Universala Esperanto-Asocio**

**KULMINO de la 102a UK**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko EKO 2017-21 sendita el Seulo, la 29an de julio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Pri la lastaj kongresaj tagoj

Grupa iro ĵaŭde celis la futbalmatĉon pere de surstrata manifestacio. Antaŭ la ekrio la manifestaciontoj iris al sporta tereno en la kongreseja areo mem, kie ili povis speris korean dancan kaj orkestran spektaklon, kun tamburado kaj cimbalsonigado. Aliĝis al kongresanoj la infanoj kaj junuloj el la Internacia Infana Kongreseto (IIK), kiuj entuziasme kundancis. Pozitivaĵo estis la matĉa rezulto: la esperantista teamo superis lokan teamon per 1:0.





Vendrede okazis la jam tradicia aŭkcio de diversaj movadaj eldonaĵoj kaj objektoj, kiu disvolviĝis kun la simile tradicia elano de la aŭkciisto Humphrey Tonkin. Fulrapide ĉirkaŭkuris helpantoj Michela Lipari kaj la asocia volontulo, Roxane Romann. La kolektita sumo dediĉiĝas al la volontula kaso de UEA.



La fermo estis aparte bonetosa. Koncizaj raportoj estis prezentitaj, ĉiu estrarano traktis po unu kampon kaj resumis la kongresajn okazaĵojn. Ĉe la kampo Kunordigo, la Prezidanto laŭtlegis la kongresan rezolucion (alkroĉitan) kiu malkaŝis, ke la 102a UK altiris 1173 aliĝojn el 51 landoj.

Sekvis anonco de la rezultoj de la Belartaj Kongresoj kaj la Oratora Konkurso. La Premio Deguchi estis transdonita de Mark Fettes kaj s-ro Asada Tokihiko reprezente de Oomoto al la jam tradicia komuna seminario unuavice el Koreio kaj Japanio, sed nun kun aldono de junuloj el Ĉinio kaj Vjetnamio. Akceptis la premion prof. Baj Giwan kaj Kitagawa Hisasi.



Tuj antaŭ la anonco de la ok ricevantoj deAtestiloj pri Elstara Agado elfalis la elektro; tio ne malhelpis la anoncadon : Normand Fleury (Kanado), Germian Pirlot (Belgio), Halina Komar (Pollando), Ronald Glossop (Usono), Jérémie Sabyyumva (Burundo), Wang Minhao (Ĉinio), Eduardo Vivancos (Kanado) kaj

Elstara Arta Agado Jonas Marx (Jonny M, Germanio). Disdonitaj estis ankaŭ atestiloj pri 40- kaj 50-jara kontinua membreco en UEA.

Gvidis la muzikan prezenton la nederlanda grupo Kajto; la publiko kunkantis rondele.



Post la ferma parolo de la Prezidanto, alvenis la pli ol 60 partoprenintoj kaj gvidintoj de la Internacia Infana Kongreseto, kies kantoj kaj viglo imponis la publikon.





Kiel ĉiam la fermo venis al kulmino kun dankoj al LKK (iuj sur la foto), artistoj kaj helpantoj, kaj la solena transdono de la flago de la nuna ĝis la sekva Universala Kongreso.

Vortoj: 345



Ĉiuj fotoj: SMG

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe:http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.